





La plej valore estas 'tranĉi-kaj-kapti' en MalSupra Dekstra angulo.




Diag. 1 (Du kandidatoj) Kiel jam skribita ĉe la digarmo de la problemo, la plej valora limaranĝo kalkuliĝas je 15 poentoj. Oni rimarkas ke la kandidatoj estas 'tranĉi kaj kapti' ŝtonon , kaj 'kapti' du ŝtonojn .

Verdire 'tranĉi kaj kapti' unu ŝtonon en la angulo estas pli valore ol 'kapti' du ŝtonojn en la rando.


Nun ni kalkulu.




Diag. 2 (Formo eltirita) Unue ni traktu 'tranĉi-kaj-kapti' N1 kaj N3. Por kalkuli la valoron,...
{paĝo 130 de la originalo}



Diag. 3 Oni devas kompari tion kun la kazo kiam Blanko sinligas per B1. Sekve de ĉi tiu diagramo,...



Diag. 4 Blanko rajtas 'bati' kiel B1 (unuflanke metrajton-tenanta).




Diag. 5 (Lim-aranĝo de Blanko) Sekvas 'bloki' N2, kaj ambaŭflanke 'sinligi' B3 kaj N4. Kiam Blanko sinligas per B1 en diagramo 3, oni supozas, ke konsekvenca estas procedo en diagramoj 4 kaj 5. (Ĉar 'bati-kaj-sinligi' de Nigro, N-a en diagramo 4 estas metrajton perdanta.)


Diag. 6 (Lim-aranĝo de Nigro; reapero de diagramo 2) Ĉi tio estas la formo post Nigra 'tranĉi-kaj-kapti'.

Kiel unue skribite, ni devas kompari diagramojn 5 kaj 6. Tamen restas plua lim-aranĝo en diagramo 6. Por la kalkulo, ni devas taksi kiom da poentoj Nigro kaj Blanko havas en la angulo ĉe la stato en diagramo 6.

{paĝo 131 de la originalo}




Diag. 7 (Metrajton perdanta) Kazon de N1 'tranĉi' kaj...




Diag. 8 (Metrajton perdanta) kazon de B1 'suben-iri' oni devas supozi, taksu la ambaŭajn gajnojn/malgajnojn, kaj preni la mezon. En kazoj 'ambaŭflanke metrajton-perdantaj' oni kalkulas tiamaniere, kiel fojfoje skribitaj.


Nun, sekve de diagramo 7,...



Diag. 9 Post 'sinligi' B2, Nigro povas 'en-rampi' kiel N3.




Diag. 10 Blanko blokas per B4, kaj ĉi tiam nepre estas 'minaci' N5. Procedas ĝis N7 'forkapti'.



Diag. 11 Post la ludofino (en japana regulo), metiĝas singardoj ▲ kaj △.

Aliflanke, sekve de diagramo 8,...

{paĝo 132 de la originalo}




Diag. 12 Lim-aranĝoj ĉi ite finiĝas post la singardoj N2 kaj B3.


Ĉi tiam oni nombras la ambaŭajn teritoriojn en la du kazoj.

Blanka teritorio en diagramo 11 nombriĝas je 5 poentoj, kaj en diagramo 12 je 13 poentoj. La mezo estas 9 poentoj.

Pri Nigra teritorio, spuro 'a' en diagramo 11, kiu kalkuliĝas kiel 2 poentoj, kaj 2 poentoj de punktoj 'b', sumante je 4 poentoj multiĝas ol tio de diagramo 12. La mezo kalkuliĝas je 2 poentoj.




Diag. 13 (Lim-aranĝo de Nigro; reapero de diagramo 2) Re-aranĝante suprajn kalkulojn, en ĉi tiu angulo oni povas taksi, ke Blanka teritorio valoras 9 poentojn kaj {multiĝo de} Nigra teritorio valoras 2 poentojn... Por faciligi la resumadon, nuligante la Nigran teritorion {multiĝontan}, oni povas taksi '7 poentojn da Blanka teritorio' ĉi tie.



Diag. 14 (Lim-aranĝo de Blanko; re-aperero de diagramo 5) En ĉi tiu diagramo, Blanka teritorio nombriĝas je 17 poentoj.

Inter diagramojn 13 kaj 14, gajno/malgajo de Blanka teritorio kalkuliĝas je 10 poentoj. Gajno/malgajno de Nigra teritorio nombriĝas je 5 poentoj, en diagramo 13, sumante 2 poentojn de spuro de forkapto 'a' kaj 3 poentojn de punktoj 'b'.

{paĝo 133 de la originalo}




Diag. 15 Resumante, Nigra lim-aranĝo 'tranĉi-kaj-kapti' N1 kaj N3 valoras '15 poentojn da diferenco'. Ankaŭ Blanka lim-aranĝo 'sinligi' N1 same valoras '15 poentojn da diferenco'. Supre skribitan kalkuladon oni povas esprimi matematike jene;


$$5 + [17 - \{(13 + 5) - 4\} / 2] = 15$$

Bonvolu vi mem esplori.

Krome, en reala ludo, anstataŭ N2 en diagramo 12,...




Diag. 16 (Komuna saĝo) Nigro devus unue tranĉi per N1 kaj due singardi per N3. Blanko kaptas la tranĉanton N1 per B4, kaj {komparante kun diagramo 12} neniom da gajno/malgajno okazas. Tamen Nigro faras tri 'kompansejojn por alterne-kaptado', nome N-a/B-b, N-c/B-d, kaj N1/B-a {sur la spuro de forkapto}.




Diag. 17 Due, ni traktu lim-aranĝon en la MalSupra rando. Nigro kaptas blankajn du ŝtonojn per N1 kaj N3. Ĉi tiu kalkulo estas facila. Sekve,...


{paĝo 134 de la originalo}




Diag. 18 Procedas 'minaco' B4 kaj 'forkapto' N5.




Diag. 19 Aliflanke, lim-aranĝo de Blanko estas B1 kaj B3.



Diag. 20 Same {al Nigra Lim-aranĝo}, procedas ĝis B5.



Diag. 21 (Lim-aranĝo de Nigro) Rezulto de Nigra lim-aranĝo.



Diag. 22 (Lim-aranĝo de Blanko) Rezulto de Blanka lim-aranĝo.

Bonvole komparu ĉi tiujn diagramojn. Nombrante spurojn de forkapto kiel po 2 poentoj por unu punkto, ambaŭaj Gajnoj/Malgajnoj estas 7 poentoj respektive. Konklude la valoro de lim-aranĝo kalkuliĝas je '14 poentoj da diferenco'. Vi legantoj jam kutimiĝas al tiu pensmaniero kaj la kalkulado.

{paĝo 135 de la originalo}